

VOKIS MI NUN POR DIRI, KE MI AMAS VIN

Esperantigo : Rovere Emanuele
Muziko kaj teksto : Wonder Stevie

La novan jaron ne celebros mi, ĉokoladkoretojn ne ricevos plu de vi;
printempoj venos sen floroj kaj sen ĝoj', tagoj enviciĝos ĉiam grizaj por refoj'.
Ne florigos plu la aprila ros' rozojn por la nupta festo en pompa etos';
vi forviŝis ĉion, sed ne ŝanĝiĝos jam, la promeso, kiun al vi faris mi kun am'.

Vokis mi nur por diri, ke mi amas vin kaj, ke vi estas valorega por mi.

Vokis mi nur por diri, ke mi amas vin: frazo venas el la kor' de mia kor'.

Ne plu ferio en varma julio, ne promenadoj sub somera luna bril';
plu ne karesos min ventet' aŭtuna, dum folioj falas birdoj flugas suden al la sun'.
Plu ne venos festoj, amuzaj karnavaloj,
ne plu kialo danki vin pro kristnaskaj regaloj,
sed ĉiam pli fortiĝas al vi mia amosent', kiu ne forlasas min eĉ por unu moment'.

Vokis mi nur por diri, ke mi amas vin kaj, ke vi estas la nura amo por mi.

Vokis mi nur por diri, ke mi amas vin: tio venas el la kor'de mia kor'.